

Frédéric Bérat ,  
Ho Normandi'

*tradukita de Adela Schafer*

Ho, ĉe l' reven' de la printempo  
post vintra frost' kaj malvarmec'  
en mia bela franca lando  
la suno brilas en helec'.  
Ho, kiam ĉio reverdiĝas,  
la hirundar' al Normandi'  
revenas, - dum ni malĝojiĝas,  
naskiĝolando kara, nur pro vi!

Mi konas Svislandeton belan  
kun ĝia neĝomontĉenar',  
en Italuj' ĉielon bluan,  
Venizon kun la gondolar'.  
Sed vidis landon mi nenie  
similan al la Normandi';  
feliĉa mi nur estis tie  
ĉe vi, naakiĝolando, nur ĉe vi!

En ĉiun vivon venas horo,  
en kiu ĉesas la revad';  
bezonas tiam ĉiu koro  
konsolon per la memorad'.  
Se ĉesos mia kantinspiro,  
mi venos tuj, ho Normandi',  
al vi, pro mia korsopiro.  
Naskiĝolando kara estas vi!

*Traduko de la Franca poemo "Ma Normandie" de Frédéric Bérat en Esperanton de ADELA SCHAFFER  
(plumnomo: Ad. Ŝefer, \*1865-02-11).*

*Arg-1029-2087 (2014-05-29 17:28:49)*

*Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro "Internacia Kantaro", eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt u. Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio. La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Bennemann. Pri la tradukintino vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Louisa\\_Frederica\\_Aдела\\_Schafer](http://eo.wikipedia.org/wiki/Louisa_Frederica_Aдела_Schafer).*